# LA PACDEFENDANTO

N-o. 21/22. NEREGULA INFORMA CIRKULERO POR ČEĤOSLOVAKIO SEPT.1953
OKTOBRO

## M A R Š U A N T A Ŭ E N !

Maršu antaŭen esperantistoj,
Avangardo de la batalantoj,
Por la paco,pioniroj fervoraj.
Vi,dissemantoj de vivo kaj am´!

El ĉiuj landoj,de ĉiuj rasoj ,
De ĉiuj partoj kaj religioj
Leviĝu unu voko,leviĝu unu kanto
Parolu unu lingvon,parolu Esper-
anton !

Represita el"Oficiala organo de hungara esperantista societo laborista": "A N T A Ŭ E N" el marta n-o.de jaro 1923. La aŭtoro estas ne menciita.

## P R I M A L N O V A J P A C B A T A L A N T O J

De Pál Balkányi-Budapest

Dro.Aleksandro Gieswein,parlamentano,papa prelato,de 1912-1921 prezidanto de hungara Esp-societo estis arda batalanto por paco kaj interkomprenigo.La pacmovadon li ĉiam kunligis kun Esperanto.La Mondpackonsilantaro deklaris neceson de kulturinterŝanĝoj,Gieswein deklaris jam antaŭ jardekoj:"Esperanto celas ebligi al la popoloj pli facilan akiron de kulturaj produktoj el la mondo."
Dum kelkaj jaroj nia prez.Frederik Karinthy/eble vi konas liajn esperantigitajn verkojn/kiu nur neperfekte sciis Esperanton,sed ĉiam batalis por ties aprobo same kiel kontraŭ la milito,por sincera paco, ĉiam akre kritikante la subpremon de popoloj,ekspluaton de laboristoj,kvankam mem li ne estis socialisto.Ke li bone vidis la veron,montras kelkaj citaĵoj el lia verko de 1917,kiujn nun represis la centra organo de la hungara partio "Szabad Nép"okaze de la 15a datreveno de lia morto.Laŭ tio li jam tiam vidis,ke la rusaj bolŝevikoj estis la solaj,veraj batalantoj por la paco.Li skribas pri angla politikisto,kiu ekstaris en la parlamento kaj trankviligis la"civilizitan mondon",ke,por la rusa revolucio ne estas kaŭzo zorgi, ĉar la ekstrema laborista partio vane provis agitadi por la paco.Oni povas daŭrigi la militon,la hombuĉadon,la neniigon de homaj vivoj kaj havaĵoj!Li skribas,kvazaŭ estus la vortoj de brita kapitalista politikisto:"Se vi demandas,kion ni devas kompreni hodiaŭ en Eŭropo sub la esprimoj ribeligo kaj agitado, mi diros ankaŭ tion: Ni devas kompreni tiun sovaĝan beston,tiun detruantan elementon de la saĝa ŝtata ordo,kiu ekskuas la fundamenton de la socio kaj volas ribeligi la popolon,kiu resume volas tion,ke l homoj iru hejmen,en siajn domojn, eksidu,tagmanĝu kaj poste iru al l kampoj plugi kaj rikolti.Jes, ni diru klare kaj kuraĝe kiel viroj , la veron: jes,tion volas tiuj revoluciuloj!"Kaj"La detruanto de la homa libereco estas la milito,amikoj.La malo de la milito ne estas la paco,sed la revolucio de la ideoj!"Li diris:ne sufiĉas la slogano"For la hombuĉadon!" Necesas forigi la malliberecon,necesas revoluciaj ideoj! Ni,vi ĉiuj,certe

havas la saman opinion kaj laboras,volas pluen labori kaj ĉiam pligrandskale por la forigo de la milito,por justa paco,por ĉesigo de ĉia malamo,nekompreno,subpremo ekspluatado,por solidara kunlaboro,por proleta internaciismo,por plibona estonto de ĉiuj nacioj,de la tuta homaro. Jen la deklaroj de k-do.Karinthy,kiuj igas nin kredi al ne skuebla fakto,ke Esperanto estas bona,utila kaj uzenda.Li diris:"Ĝi realigas nian deziron,ke ni komprenu nian homfraton,la alian homon,komprenu k.ekamu lin kaj kiam li malfermas sian buŝon kriante al mi,"mi parolas esperante",mi parolas ne kaoson kaj malamon - mi parolas la Esperon!" -

Rememorante la mortotagon de tiu nobla kaj saĝa verkisto, nia amiko,ni kaj vi per ĉiuj fortoj laboru por la paco,progreso,solidareco kaj interkompreno,ni parolu la Esperon!

oooooooooooo

SALUTON AL NOVA KUNBATALANTO

Ankaŭ en la popoldemokrata Polio la Esperanto movado reaktiviĝas. Jam aperis la 3a n-o.de esperanta bulteno titolita"GLOS ESPERANTISTÓW",kiun kuraĝe eldonas filio de Polia Esperanto Asocio en la urbo Wroclaw.Malgraŭ tio,ke ĝia tuta enhavo estas skribita en pola lingvo,ĝi tamen faras sian laboron, vekante la polajn esperantistojn kaj instigante kaj kuraĝigante ilin al plua batalo por nia nobla afero.Estus dezirinda aperigi en ĝi almenaŭ kelkajn raportojn pri la Esp-movado en Polio en Esperanto por la eksterlandaj legantoj al kiuj necesas la polajn gekamaradojn kunligi. Por tiu celo necesus ankaŭ publiki rubrikon kun korespond-anoncoj. Ni deziras al la polaj k-doj.multan sukceson!

;;;;;;;;;;;

LETERO EL BULGARIO

Koncerne Esperanto ne ekzistas organiza vivo.La Esperanto asocio montras nenian vivsignon,kvankam ĝi ne estas nuligita kiel en Ĉeĥoslovakio.Nur la Esperanto-kooperativo en Sofia iometé flagretas per vendado de Esp-libroj.Novaj libroj ne estas eldonataj nek unu modesta ciklostilita bulteno.

Tamen ĝojiga fakto estas,ke multaj bulgaraj esperantistoj vigle laboras;korespondadas,propagandas nian lingvon ktp.. Bedaŭrinde kursoj ne estas aranĝataj.Ĉiu lernas mem,ofte per helpo de pli spertaj kamaradoj.Mi mem varbis en nia loko pli ol 10 adeptojn kaj vekis intereson kaj simpation por Esperanto inter niaj loĝantoj.

Bejko Markov,Gara Levski,Bulgario.

oooooooooo

EMOCIAJ ESPRIMOJ

Post pli ol du monata interrompo kaj denova sukceso ekspedi nian bultenon al ĉiuj abonantoj,nia redakcio ricevis aron da leteroj,enkiuj ili esprimas kun profunda emocio sian dankon al ni,pro la klopodo daŭrigi la eldonadon de ĉi cirkulero. Ni publikigas l.el tiuj leteroj:

"Dankeme ni ricevis vian PACDEFENDANTOn el Olomouc.Honesta batalo pri kiu mi estas ankaŭ firme konvinkita,ke estas necesa,ne estas vana! Viajn vireca jn vortojn je defendo kaj gusta celo de nia Esperanto oni legas kiel Evangelion de nova homo.Mi gratulas al viaj sukcesoj! Mi,kiu ankaŭ arde amas pacon,progreson kaj veron,malamante militon, ekspluatadon kaj ĉiun malbonon,plene konsentas kun via alvoko al persista laboro por justeca afero. Jes progresemaj esperantistoj ne estas fabrikitaj el margarino.Mi ankaŭ havas multjarajn spertojn,mi bone scias,ke estas nia devo honeste batali por la bono de la homaro.El nia ĝusta vojo neniu forto de falsa iluzio povas forkonduki nin!"

Vladimír MALÝ kaj Bedřich MUNZAR el uzino MILETA Ol.en HOŘICE/Podkrkon./

Ne eblas publiki pluajn da leter. pro manko de loko.Ĉiuj parolas simile.La batalo por la paco kaj Esperanto forte kunligas nin ĉiujn,ĉu profesorojn,instruistojn,pastrojn,inĝenerojn,ĉu simplajn laboristojn,virojn aŭ virinojn,ni ĉiuj staras forte sub la standarto de nia nobla afero.Pro tio mi devas rifuzi vian dankon k.meriton,ĉar nur dank'al via komuna helpo ni en kamarada kolektiveco kapablas venki ĉiujn malfacilaĵojn k.barojn.

R. B.

## NIA MOVADO EN ČEĤOSLOVAKIO

PLZEŇ, la 30/9.okazis la ĝenerala kunveno de nia rondeto, kiu post la deviga likvido fare de la Urba kleriga klubo transiris al la klubo de poŝtistoj. En la nova klubejo,gastejo„U Fišerů", Sedláčkova str.39,kunvenis 16 anoj,kiuj elektis k-dinon Pavla Maroušová kiel deleg.de la rondeto por la komitato de la klubo.Estis decidite,ke la rondeto funkciu plu laŭ ĝisnuna maniero. Kurson por infanoj gvidas k-do. Burda en sia loĝejo kaj kdo-dro.Jos.Černý instruas al 5 progresintaj infanoj ankaŭ private. Kurso por matur.homoj prepariĝas .Jam aliĝis 8 interesuloj.

OSTRAVA, la 29.10.53.okazis publika parolado de k-dino.instr. Hartmanová-Havránková el Luhačovice pri ŝiaj spertoj el vojaĝo tra Nederlando.La parolado faris bonan propagandon.

OPAVA, la 8.de okt.komenciĝis nova Esp-kurso kun č.30 gelernantoj.Inter ili estas ankaŭ infanoj.Instruas k-do.Kuzník anstataŭ k-do.Novobilský,kiu devis foriri al Praha.En propaganda kampanjo Esp-junularo eluzis la urban radio-disaŭdigon,ekspoziciajn kestojn kaj vizitis metiolernanthejmojn kaj fabrikejojn por varbi novajn adeptojn por Esperanto. En uzina gazeto de konstrulaboristoj estis publikita longa propaganda artikolo sub titolo„Sub la verda stelo -armilo de paco",kiu tre konvinkige varbis por novaj kursoj.

PŘÍBOR, dum konferenco de esp-istoj el regionoj OSTRAVA kaj OLOMOUC okazinta la 25/10.en Příbor parolis k-do.d-ro.Pawlik pri„Manko de teknikaj vortoj en Esperanto"kaj la uzina klubo TATRA prezentis interesan kulturan programon kun la celo pliviglig nian movadon kaj garantiigi gian pluan progreson.

## ALVOKO

Baldaŭ finiĝos la jaro 1953.Nia administracio kune kun la redakcio ĉielmaniere klopodis dum la tuta jaro,malgraŭ la abundaj malfacilaĵoj kaj baroj,kontentigi la abonantojn.Vi bone scias ke la monreformo kaŭzis al ni senvalorigon de niaj financoj, plue la likvido de nia rondeto en Plzeň kaj la transdono de la eldonejo al Olomouc denove kaŭzis al ni elspezojn.Malfacile ni aĉetas la necesan kvanton da papero kaj aliajn materialojn. Dume multaj abonantoj ankoraŭ ne pagis sian kotizon por tiu ĉi jaro.

Ni do insiste petas,senprokraste sendi al ni vian kotizon, t.e.6.-Kčs por 1953 eble en ordinara letero al k-do.R.Burda, Palackého nám.č.6,PLZEŇ.

Se vi deziras,ke ni plenumu nian devon,poste ankaŭ necesas, ke vi plenumu la vian ! -

## MUNICIO POR NIA BATALO

K-do.Ronald Lynn-Anglio 6 resp. kuponoj kiel helpo al nia cirk.

## NEKROLOGO

Vendrede la 16.de oktobro 1953 je la 8.horo 30 min.mortis nia kara k-do.

František N O V Á K

fervojisto/rentulo/.

Pli ol 40 jarojn li aktive laboris en la Esp-movado kaj estis unu el la fondintaj membroj de la laborista Espmovado en Plzeň. La 20.de okt.je la 15.horo kune kun la familianoj,parencoj kaj amikoj,kolektive partoprenis la funebran ceremonion en la krematorio de la Centra tombejo en PLZEŇ liaj esp-istaj gek-doj.

Dum la funebra parolado k-do.Rud. Burda akcentis ĉiujn meritojn,kiujn havis la mortinta k-do.Novák en la E-kaj porpaca movado kaj adiaŭis kun li en ĉeĥa kaj esperanta lingvo en la nomo de la plzena kaj tutmonda esperantistaro.K-do.Novák mortis en aĝo de 71 jaroj pro kormalsano.Lian freŝan tombon ornamas bela krono da rozoj kun verda rubando,kiel lasta donaco de la esperantistaro.

NI SERĈAS RONDETON,KIU POVUS ELDONADI NIAN CIRKULERON.Ciklostilmaŝinon,paperon,tekstojn kaj ĉiun alian necesan materialon ni donas al dispono.Vi nur multobliĝos kaj distribuos.

Anoncu vin tuj ĉe nia redakcio!!!!!!!

# N I A  M O V A D O  E N  Č E Ȟ O S L O V A K I O

SÍDLOVEC, apud Ostrava, en tiu či loko laboras kiel brigadistino nia ko-nata operkantistino Věra BORSKÁ en granda konstruejo de socialismo. Post la peza taglaboro ši instruas en ubikacio al brigadistoj Esperanton. La kurson partoprenas čefe junularo. Du el ili jam deklamis kaj raportis post unumonata lernado dum esp. laborkonferenco en Hradec u Opavy. K-dino. Borská instruas čiu vespere post la taglaboro en malgranda klubejo. Post la instruado la lernantoj kantas kaj amuzas. Činlingvaj pacafišoj propagandas Esperanton en diversaj lokoj, kie ši ilin surmurigis. 2 pendas en la ubikacio.

PRAHA, malnova pioniro de Esp-movado d-ro. Aůgustín Pitlík festis la 24.7. sian 70jaran naskiǧtagon en plena vigleco kaj saneco. Li vivu ankoraů multajn jarojn inter ni!

BRNO, /la urbo de prof. Trávníček/ niaj gek-doj. kunvenas regule čiu mardo de 19.30 h en hotelo "SLOVAN" /antaůe: Pasage/Lidická str. 23. Ili jam preparis interesan programon de amuzoj kaj prelegoj por la monatoj septembro ǧis decembro. Ǧin prezentos pli ol 10 gek-doj. kune kun la E. junulara grupo.

PRAHA, la esperant. rondeto če la urba kultura klubo en PRAHA II. eldonis jam la 6an n-on de sia bulteno, 2paǧan n-on multobligitan po 600 ekz. Helpu la pluan aperadon de tiu či bulteno per donaco aů vendo de necesa cikl. papero al k-do. Jar. Šustr, Dlouhá 10, PRAHA I. La rondeto arangǧas čiu merkrede "Klubvesperojn" kun interesaj programoj en restoracio "U Šumavy" PRAHA II, Štěpánská č.3.

FRÝDLANT, la 20.de sept. okazis či tie laborkonferenco de esp-istoj el la regionoj Ostrava kaj Olomouc Posttagmeze oni ekskursis en la Beskýdojn sur monton Ondřejníjk. Estis multnombra partopreno kaj vere aktiva kunveno. Detala raporto aperos en la venonta n-o.

OPAVA, la someran tendaron de esp. junularo partoprenis čirkaů 50 esperantistoj el Opava, Praha, Ostrava Třebič, Brno, Olomouc, přerov kaj Chrudím krom la gastoj el čirkaůajo. K-do. Werner el Lanškroun kaj Skvrna el Ostrava instruadis. Pri Marks-leninismo kaj pri Nuntempa Esperanto [illegible] relegis k-[illegible] prof. Kože-

vigla diskuto, kiu estis tre instrua por la partoprenantoj.

MIKULOV, pastro, k-do. Alfons MACEK, kanoniko de la kapitolo de Sankta Venceslao, instigis 4 personojn al lernado de Esperanto. Nun li pruntadas al ili regule siajn librojn por ke ili perfektiviǧu. La nomita k-do. scipovas 10 fremdajn lingvojn sed Esperanto estas por li la plej šatata. Li afable proponas en tiu senco al ni sian servon.

KOPŘIVNICE, la entreprena konsilantaro proponis kiel delegitoj por la Renkontiǧo de esp. pacdefendantoj en St. Pölten niajn plejfavorajn k-don. Rudolf Zanáška kaj k-dinon Marta Hrčková.

KROMĚŘÍŽ, la 10.de novembro festos nia konata k-do. d-ro. Stanislav Kamarýt sian 70jaran naskiǧtagon en plena frešeco kaj entusiasmo por nia afero. Tiu okaze la Esp. klubo če la Kleriga societo "komenský" en Brno publikis en sia bulteno belan poemon dedičitan al lia naskiǧtago de k-do. Jiří Kořínek. Al ǧi aliǧas ankaů nia redakcio, dezirante al d-ro. Kamarýt ankoraů longan kaj feličan vivon, por ke li atingu komune kun ni la sopiratan venkon!

PLZEŇ, post likvido de nia rondeto fondiǧis nova, kiu kunvenas regule en gastejo "U Fišerů", Sedláčkova s. čiu merkrede de 19.30 h. Estas laůt legataj interesa korespondaǰo kaj gaz. el eksterlando. Ǧenerala membro-kunveno okazos la 30.de sept. 1953 ǰe la 19a horo en la sama klubejo. Čiuj membroj kaj gastoj estas kore bonvenataj.

KLATOVY, post la ferioj rekomencis la societa vivo. Prepariǧas novaj kursoj kaj baldaůa ǧenerala kunveno, kiun partoprenos ankaů gekdoj el regionoj Plzeň kaj České Budějovice.

SOBOTKA, la tradicia Esp. somera kolegio okazis či jare de la 5-15. aůgusto en la kastelo "KOST". Partoprenis 54 gelernantoj, inter ili 10 el Slovakio. Instruis k-doj. Šolc, Píč, Slanina, Pytloun kaj k-dino. Suchardová. Krome prelegis k-do Mařík kaj Hromada. Okazis 3 kursoj; elementa, perfektiga kaj supera en lernejo de proksima vilaǧo Libošovice. Čiu vespere estis amuzaj kaj kulturaj programoj krom 2 dancamuzoj

HO,KIEL BELA ESTAS LA MONDO !

Sidante če radioaparato mi aŭskultas la čarmajn melodiojn el diversnaciaj sendstacioj kaj mi cerbumas; kia mirinda eltrovaĵo,kiun kapablis konstrui homoj.-Kian ĝuon havas la homoj,se ili povas sidante en sia hejmo aŭskulti la arton de čiuj,eč plejmalproksimaj popoloj.-Kaj la televidaj aparatoj, aŭtomobiloj,flugmašinoj kaj la lasta miraklo -atomenergio.- Kiom saĝaj jam fariĝis la homoj en ilia scio, ili kapablas eč enpenetri la homajn korpojn por forigi ankoraŭ antaŭ ne longe terurajn malsanojn , kiel tuberkulozon/ftizon/ ktp.Oni ne plu permesas aperon de ĥolero kaj pesto,kiuj forrabis amase la homojn el urboj,vilaĝoj kaj tutaj regionoj. Ja la homoj eč posedas jam komunan lingvon por reciproka interkompreniĝo uzatan inter la plejdiversaj nacioj kaj kontinentoj.-Kiam mi migras tra la lando,observante la belecojn de la naturo, kiujn la mondo kreis,mi kun admiro restas stari antaŭ arbo,pripensante,kiel maniere eblas,ke tia ronda trunko povas el simpla tero čerpi materialojn por produkti tiom da belaj kaj bongustaj fruktoj kaj el la sama tero aliaj arboj,tute aliajn fruktojn.- Belegaj floroj kaj aliaj kreskaĵoj rigardas nin , kaj kvazaŭ vivaj ili turnas siajn vizaĝojn laŭ la suno kaj taglumo kaj vespere ili same kiel la homoj klinas siajn kapojn por dormi,ĝis ki-am nova tago ilin revekiĝas,-

Ho,kiel bela estas la mondo kaj kiom saĝaj la homoj,vivantaj en ĝi! Kiom feličaj ili povus esti,se ili scius eluzi čiujn,tiujn avantaĝojn por la bono de la tuta homaro! Sed bedaŭrinde konstante ankoraŭ terura nigra nubo sin etendas tra la mondo kaj nebuliĝas la cerbojn de la homaro.Ĝi vivas kvazaŭ brutaro, lasante sin gvidi de ruzaj saĝuloj al stulteco eč sovaĝeco.Ili misuzas la eltrovaĵojn de scienculoj por reciproka murdado kaj detruado,ili uzas ilin por sia propra pereigo , por detrui homojn kaj bestojn kune kun la naturaj mirindaĵoj kaj belecoj. Neniu pripensas,ke li nur kvazaŭ papilio momenton vivas sur tiu či mondo,ili kredas sin "Superhomoj" kiuj eterne restas vivaj.- Ili ne pripensas,ke urĝas eluzi čiun momenton kaj tempon por vivi feliče kaj lasi tiel vivi ankaŭ la aliajn.

Kelkaj vivas nur de la laboro kaj vidas kaj sentas nenion plu.Ili estas sklavoj de la laboro.Aliaj vivas nur el la laboro kaj peno de aliaj kaj ankaŭ tiuj,kvankam ili sen-tas sin ričaj,tamen estas malfeličaj.La spirito mankas al ambaŭ tiuj kategorioj.Tia stato ankaŭ plejofte kaŭzas la sensencajn kaj terurajn militojn.

Kial la homoj ne povas ĝui la belecojn de la naturo kaj la verkojn de scienculoj kaj teknikistoj por sia bonfarto? Kial čio nur devas servi al ilia pereo? La kaŭzo estas en tio,ke la homoj nur malofte estas emaj pri šajne malfacilaj problemoj pripensi kaj lasas pensi k.agi anstataŭ siaj cerboj, kelkajn ruzulojn,kiuj daŭre agas kontraŭ ili Ču la mondo estas tiom malgranda kaj malriča,ke ĝi ne sufičus feličigi čiujn homojn sur ĝi vivantajn? Certe ke ne estas tiel.La mondo estas kapabla feličigi čiujn homojn sur ĝi vivantajn,se ili mem tion al-celus. Unuavice la homoj devas peni mem pensi por esti kapablaj disdiferencigi la bonon de la malbono! Ili mem devas konstrui sian feličan vivon en la konkordo kun la feličo de la aliaj kunhomoj!

Ču tio ne estus komunismo?- Tute ne gravas,kiel tia stato nomiĝus, sed la čefa afero estas,ke la homoj reciproke sin šatu,amu kaj feličigu! Unu estu helpema al la alia por atingi tian staton kaj tiam čiuj kapablos eluzi sian mallongan tempon de la vivo por vivi feliče kaj trankvile kaj por heredigi al la estontaj generacioj ankoraŭ pli feličan kaj pli ĝojan vivon.

Unu homo en la mondo signalis prave: „Lerni,lerni kaj ankoraŭ lerni!"Kiel li nomis,ne gravas,sed liaj vortoj esprimas multon!Mi pensas,ke venis jam la tempo,ke la homoj efektive lernu.Ili lernu el la pasinto!Ču ne la du lastaj teruraj mondmilitoj demonstraciis al ni sufiče instruajn bildojn?Ču ni volas atendi novan ripeton?-Ni lernu kaj lernu!Ni čiuj pripensu!Se čiuj homoj lernos kaj kapablos memstare pensi,neplu povos okazi,ke ili reciproke sin murdos k. kiel stultuloj sin kondutod.

R.Burda

La mondo estas belega - lernu vian vivon igi feličan!

## K O R E S P O N D I   D E Z I R A S :

K-do.Max HIRSCH/46j/Radeberger Str. 38 E,BONNEWITZ ü.PIRNA,DDR.Germana Demokr.Respubliko,kun č.l.

K-do.K.KLEIN,KOBYLNÍKY 25,okr.Slaný pp.Klobuky v Č.Čeĥoslovakio,kun č. landoj,precipe Afriko,Aŭstralio kaj Svisio,per il.p.k.kaj p.m.

Ĉeĥoslovaka Akademio de Scienco-Orienta instituto en Praha,tre interesas ricevi el asiaj,orientaj kaj afrikaj landoj ilustritajn revuojn aŭ en Esperanto aŭ en nacilingvoj por siaj studioj.La gek-doj estas petataj sendi amase tiajn revuojn kun esp-lingva akompana klarigo pri la abonkondiĉoj.En la titolo de via let.notu la signon:Čj.823/53-DS. La instituto ankaŭ rekompencos vin per similaj revuoj el Ĉeĥoslovakio.Sendu al:ČESKOSLOVENSKÁ AKADEMIE VĚD - Orientální ústav,Lázeňská 4,PRAHA - III,Ĉeĥoslovakio.

K-do.Karl KLEPITSCH,Hubertusstr.93, KLAGENFURT,Kärnten,Aŭstrio,kun kdino por interŝ.diversajn pensojn.Komprenas iom ĉeĥe kaj korespondas ankaŭ germane.

K-do.Nedeltčo Dimitrov Dobrev,nog. 45780„Y" rp. STANKE DIMITROV,Bulgario,kun junularo inter 18-25 jaroj el ĉiuj landoj/speciale el ČSR/

K-do.Gaston TRÉMON,122 Avenue Thiérs VILLEURBANNE/Rhône/Francio,dankas al ĉiuj ĉsl.gek-doj por la proponita helpo kaj bedaŭras,ke li ne ricevis la necesan vizon de la ĉsl.ambasadoro por vojaĝi al nia lando.Li forte esperas,renkontiĝi kun la ĉsl. gek-doj dum la Junulara festivalo en Bukaresto.

K-do.Zdeněk CHLEBEK,Vaníčkova č.38, OPAVA-KYLEŠOVICE,Ĉeĥoslovakio,/13j/ kun ĉiuj landoj,precipe kun Urugvajo Ĉinio kaj Belga Kongo pri lerneja vivo,literaturo kaj sporto.Interŝanĝas p.m.kaj il.p.k.

K-dino.V.HAHNOVÁ/25j/ Vaníčkova 38, OPAVA-KYLEŠOVICE,Ĉeĥoslovakio, pri ĉiuj temoj,speciale pri literaturo, arto kaj modoj.

K-do.Hiroŝi Haruta,ĉe Josiharu Sindo Gobo-tyo,Hidaka-hospitalo,WAKAYAMA - ken,Japanio,pri Ĉeĥoslovakio kaj kontakti kun pacdefendantoj el č.l.

---

### INTERNACIA RENKONTIĜO DE ESPERANTISTOJ-PACDEFENDANTOJ

Unua renkontiĝo de esp.-pacdefendantoj okazis septembre 1953 en St.Pölten en Aŭstrio spite diversflankajn malhelpojn. Partoprenis ĝin aktivaj gekamaradoj el multaj landoj kaj precipe el Aŭstrio. Salutleteron en la nomo de la abonantoj de nia bulteno sendis k-do Burda. El la renkontiĝo estis forsendita saluttelegramo al la Monda packonsilantaro kun propono pri kunlaboro. K-doj el Francio estis komisiitaj kontakti kun k-do J. Curie kaj E. Cotton. Kiel prezidanto de la fondita "Mondpaca Esperanto-Movado" estis malgraŭ neĉeesto elektita k-do Burda /Ĉeĥoslovakio/. K-do Balague /Aŭstrio/ fariĝis generala sekretario. Kiel centra organo de MEM funkcios ĉiumonate alia esp. gazeto el diversaj landoj, kiu estos ekspedota al tutmondaj abonantoj. Ĉar ne temas pri fonfo de nova asocio, oni ne postulas de siaj anoj membrokotizojn. Delegitoj /perantoj/ el ĉiuj landoj formos la komitaton. Detalan raporton ni aperigos en la venonta numero de la bulteno.

### REGISTARO DE AUSTRIO SUBTENAS ESPERANTON.

Ministerio por instruado en Aŭstrio komunikis al Aŭstria Esperanto-Federacio, ke ĝi decidis asigni al ĝi subvencion de 1.000 ŝilingoj.

### AĈETEBLAJ ĈINAJ BROŜUROJ KAJ ĈINAJ PACAFIŜOJ.

Libroj "La plej forta voĉo de la paco" kaj "Por nova afero-nova maniero" estas ankoraŭ en limigita kvanto aĉeteblaj por 6 Kčs /inkl. poŝtafranko/ ĉe k-do Rudolf Burda, Palackého n. 6, Plzeň. Ĉe li estas riceveblaj ankaŭ ĉinaj pacafiŝoj kontraŭ pago 4 Kčs por 5 ekz. Plue li povas liveri Esperanto-insignojn /sur blanka kampo verda stelo/, 1 peco por 2.5Kčs.

---

Eldonis: OSVĚTOVÁ BESEDA-OSTRAVA-ZÁBŘEH, ODBOR ESPERANTO "KOMENSKÝ".
REDAKTIS: K-do Rudolf B u r d a, Palackého nám. č. 6, P l z e ň,
Ĉ E Ĥ O S L O V A K I O .